

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Kirjeeva
Olga
[Medvejje, Rusio]

Aŭtunaj siluetoj

2003

Kiel Nikolao Gudskov, prezidanto de Rusia E-Unio iĝis esperantisto la tria periodo de E-literaturo — verkoj de niaj legantoj — gramatiko serioze kaj amuze — bildoj de infanaĝo — neelpensitaj historioj aforismoj — anekdotoj — diversaj ondoj el bunta mondo skribu al Avo Frosto — korespondu!

5

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Franco Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA 14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković,

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallo Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckeavagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

En tiu ĉu numero la tradicia rubriko "Kiel tio komenciĝis" rakontas al vi historion de esperantistiĝo de nuna prezidanto de REU Nikolao Gudskov kaj ankaŭ prezentas lin al vi kiel bonan poeton kaj tradukiston.

Ni invitas vin ankaŭ ĝui talenton de la plej konata humoristo en E-literaturo Rajmond Schwartz, al kiu ĉi-foje estas dediĉitaj niaj literatur-historiaj paĝoj.

Literaturaj provoj de niaj legantoj portas iom da filozofio pri la vivo kaj la mondo. Ĉe la gramatikaj paĝoj vin renkontas novaj ŝercaj ekzercoj kaj seriozaj lingvaj respondoj.

En rubriko "Tempo kaj homoj" ĉi jare ni jam prezentis kelkajn rakontojn de niaj legantoj el sia vivo. Ĉi-foje vi povos legi poetikan rakonton de Vladimir Opletajev el Surgut, faritan en ĝenro de rememoroj.

Ni esperas ke vin, kiel ankaŭ nin mem, impresos materialoj sub la titolo "Diversaj ondoj el bunta mondo". Vere varma kaj karesa ondo de rememoroj pri neforgesebla lando Italio kaj mirinda tempo, pasigita tie, tuŝis nin dum ni legis tiujn du verkojn de niaj italaj aŭtoroj.

Avo Frosto invitas ĉiujn infanojn skribi al li leterojn en Esperanto.

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

2003 numero 5 // (43) // 6 numeroj jare regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

retpaĝo: <http://Esperanto.net/Komencanto>
abontarifo por 2004:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orientalropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

al por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menci **KOMENCANTO**'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Kiel tio komenciĝis



La vorton "Esperanto" mi aŭdis jam kiam estis lerneĵano: jen ĝi hazarde sonis en radioelsendo, jen prononcis iu konato, jen renkontiĝis en iu literatura verko... Nur en 1982 mi subite renkontis pli detalan priskribon de la lingvo, kaj tiam mi decidis lerni ĝin...

Tiutempe mi estis aspiranto en la Akademia Instituto de la Historio de la Natursciencoj kaj Teknikoj, kie okupiĝis pri mia disertacio pri historio de biologio. Kaj estis du cirkonstancoj, kiuj puŝis min al Esperanto.

Unue, ĉiuj scivolemaj biologoj kaj kemiistoj tiutempe abonadis kaj legadis brilan scienc-popularan revuon "Ĥimija i jiznj" (Kemio kaj vivo), kaj mi, kiel ankoraŭ relative juna sciencisto, certe estis ĝia fervora leganto. Due, okupiĝante pri histori-sciencaj esploroj, mi sentis, ke ne sufiĉis por mi la nura angla lingvo – mi nepre bezonis, krome, almenaŭ la germanan. Dum du jaroj mi penepenege parkerigis "fortajn" verbojn, provis kompreni mistikojn de la kondicionalo ktp... Finfine mi ekkapablis legi kelkajn bezonatajn por mia laboro fakajn artikolojn kaj librojn – sed nun, bedaŭrinde, la mizeraj scioj, ricevitaj post tiu dujara penado, plene elvaporigis el mia kapo, kaj la germana denove estas por mi same fremda, kiel la ĉina, araba kaj ceteraj miloj da lingvoj! Kaj ĉio tio estas malgraŭ ke la sonado de la germana, kvazaŭ speciale kreita por muziko, por kantado, al mi ege plaĉas...

Do, en iu bela tago mi malfermis la freŝan numeron de "Kemio kaj vivo" kaj ekvidis komencon de la 16-

Nikolaj Gudskov
Prezidanto de Rusia Esperantista Unio, aŭtoro de "Epitomo de Esperanto"

Ĝis nun E-agado estas la plej interesa parto de mia vivo

leciona kurso "Esperanto por kemiistoj" far Boris Grigorjeviĉ Kolker. Mi tralegis la unuajn lecionojn... Revelacio! Okazis, ke ekzistas lingvo, kiun ja eblas ellerni! Kaj lingvo kun evidente pacifisma – do, proksima al mia animo – ideo! Jam post kelkaj tagoj mi kapablis legi la tekstojn en Esperanto ne malpli bone, ol en dum du jaroj lernita germana!

Do, kiam la kurso plene aperis en la revuo, mi faris la finan kontrolan laboron, ricevis ateston pri tio kaj baldaŭ estis, kune kun dekoj da aliaj similuloj el Moskvo, invitita al la kluba kunveno. La renkontiĝo tre min impresis, mi komprenis du trionojn de tio, kion diris en Esperanto aliaj esperantistoj, sed evidentiĝis, ke tio ne sufiĉas: por vere regi eĉ tiun bonan lingvon, necesas lerni plu. Sed la personaj cirkonstancoj tiutempe ne tre permesis tion: mi devis multe labori pri la disertacio kaj tempo por kromaj okupoj mankis. Do, mia "plena" esperantistiĝo estis konscie prokrastita.

Sed post kiam mi ricevis, finfine, la sciencan gradon (kio okazis somere de 1985), mi povis permesi al mi iujn kromajn okupojn. Kaj tiam la unua mia ago estis veni al la Esperanta klubo kaj enskribiĝi al la kurso. La kurson gvidis tute juna tiam Miŝa Povorin, kiu mem konatiĝis kun Esperanto dank' al "Kemio kaj vivo", sed jam perfekte posedis la lingvon kaj ĝin instruis. Li instruis helpe de la lernolibro de Semjonova kaj Isajev gramatikmetode, kaj akompanis la lecionojn per kantoj. Tiun metodon kaj tiun lernolibron mi ĝis nun plej fidis. Almenaŭ, post du monatoj mi jam povis paroli, kaj, kiel montris la sperto, sufiĉe libere komunikiĝi kun eksterlandaj esperantistoj.

Ĉar mi laboris en scienc-esplora instituto, mi baldaŭ aliĝis al "scienc" E-klubo, kiun gvidis Leo Medvedev. Mi uzis ajnan eblecon por paroli kaj perfektigi en la lingvo, kaj penis ĉiutage legi ion en Esperanto. Post ankoraŭ unu jaro mi, ne rimarkinte kiel, jam estis konsiderata

de ĉiuj kiel esperantisto-aktivulo. En 1987 dum iu mia babilado kun Stanislav Koncebovskij, aperis la ideo krei kooperativon por instrui Esperanton. La kooperativo estis vere kreita, ekfunkciis, kaj mi de tiu tempo okazis envolvita en la vivon de esperantista komunumo kaj ĝis nun E-agado estas la plej interesa parto de mia vivo.

N. Gudskov

Se al iuj el la legantoj tiu ĉi rakonto ŝajnis iom seka raporto pri ordinaraj eventoj de la vivo, ni invitas vin legi plu kelkajn kreaĵojn de N. Gudskov kaj malfermi por si ankaŭ aliajn facetojn de tiu ĉi neordinara persono: lian romantikemon, filizofitemon, humuremon.

El la rusa esperantigis **Nikolao Gudskov**
Andrej Dementjev

Pri nenio bedaŭru

Vi neniam, neniam pri io bedaŭru, –
Tio, kio okazis, okazis. Do jen:
Kredu vi, por ke via bedaŭro ne daŭru –
Kun pasinto ŝinĝis etera faden'.

Ne bedaŭru pri io, se ĝi estas natura,
Se por viaj intencoj ekzistas la lim',
Nur la lag' de l' animo ĉe vi restu pura,
Birde ŝvebu esperoj en via anim'.

Ne bedaŭru, se estas vi bona donanto,
Eĉ se venas responde nur mok' kaj rekan'.
Tiu iĝis genia, alia – gvidanto...
Sed ne tuŝis vin ties turmentoj kaj van'.

Vi neniam bedaŭru pri sekiĝo de puto,
Pri komenco malfrua, pri mort' sur pavim'
La alia – genie li ludu ja fluton,
Sed la kantojn li prenas el via anim'!

Pri nenio bedaŭru. ne perdu larmgutojn,
Ĉu pri tagoj pasintaj, aŭ pasinta pasi'.
La alia... Genie li ludu la fluton,
Tamen eĉ pli genie aŭskiltis lin vi.

El la rusa tradukis
Nikolaj Gudskov

Aleksandr Blok

Knabino kantis en templa ĥoro
Pri ĉiuj lacaj sur fremda ter',
Pri ĉiuj ŝipoj en mara foro,
Pri ĉiuj vagaj sen ĝoj' kaj ver'.

La voĉo ŝvebis, dolĉa kaj pura,
Sur blanka ŝultro brilis radi',
Kaj ĉiu atentis el obskuro
La blankan robon en luma stri'.

Kaj ĉiu pensis, ke ĝojo venos,
Ke ŝipoj havenon atingos tuj,
Ke al laculoj jam apartenas
Serena vivo en fora fremduj'.

La voĉ' kaj radio mallumon boris.
Nur sore, ĉe Caro, pro vana pen'
Konanta misterojn, infano ploris
Pri tio, ke eblas nenies reven'.

Nikolao Gudskov

Ekzerco

*inspire de ka kernolibro de B. Kolker
"Vojaĝo al Esperanto-lando"*

Kiom da kapoj – tiom da ĉapoj,
Kiom da kampoj – tiom da rapoj,
Kiom da katoj – tiom da vosto,
Kiom da varoj – tiom da kosto.

Kiom da inoj – tiom da vestoj,
Kiom da ratoj – tiom da pestoj,
Kiom da pastroj – tiom da trompoj,
Kiom da veroj – tiom da bomboj.

Kiom da lipoj – tiom da kisoj,
Kiom da homoj – tiom da misoj,
Kiom da estroj – tiom da ordoj,
Kiom da dentoj – tiom da mordoj.

Kiom da uloj – tiom da veroj,
Kiom da floroj – tiom da beroj,
Kiom da mono – tiom da kestoj,
kiom da birdoj – tiom da nestoj.

Kiom da noktoj – tiom da lunoj,
Kiom da krimoj – tiom da punoj,
Kiom da tagoj – tiom da datoj,
Kiom da stultoj – tiom da batoj.

La tria periodo de esperanta literaturo

Karaj legantoj!

Sur la paĝoj de tiu ĉi kajero ni prezentas al vi la plej faman reprezentanton de la ŝerca (eĉ satira) literaturo en Esperanto, francan aŭtoron, en kiu nia "Esperanta mondo trovis sian humoriston", R. Schwartz. Kiel verkisto li debutis ankoraŭ dum la unua literatur-historia periodo, poste lia verkista agado estas dividebla en du partojn: la poezian, tiel nomatan "kabaretistan" kaj pli seriozan, prozan parton. Ni jam mallonge rakontis pri Schwartz, kiam prezentis francan literaturan skolon en la dua periodo. La aŭtoro aktive verkis ankaŭ dum la tria literatur-historia periodo, kiam aperis liaj ĉefaj prozaj verkoj.

Raymond Schwartz naskiĝis 8 apr. 1894 en franca urbo Metz. Profesie li estis bankoficisto. Esperantistiĝis Schwartz ankoraŭ antaŭ la unua mondmilito. Estinte nur 19-jara junulo, li fondis en 1913 en Metz esperantistan societon "Amika rondo". Jam en 1912 li publikigis siajn rimajojn en E-gazeto "Tutmonda Espero" kaj post la milito poemojn kaj artikolojn en diversaj gazetoj, precipe en "Literatura Mondo".

Baldaŭ R. Schwartz translokiĝis el Metz al Parizo, kie ekde 1920 ĝis 1926 gvidis grandfaman literaturan Esperantan kabareton sub nomo "Verda kato". Post la dua mondmilito (dum 1944-1956) ĝi nomiĝis "Tri koboldoj". En 1926 aperis libro de R. Schwartz "Verdkata testamento", kiu enhavis pli ol sepdek humorajn versaĵojn, verajn Parizajn kanzonojn laŭ kabareta stilo. Ĝin sekvis "La stranga butikoj" en 1931, kiu estis ankaŭ kolekto de versoverkoj. Kabaretista aktivado de Schwartz kaj supremenciitaj liaj verkoj kontribuis al mito pri li kiel epikuristo, vivĝuanto kun vinbotelo. Al tiu ĉi mito multe kontribuis ankaŭ verkita de K. Kalocsay la rimportreto: "Jen, Raymond Schwartz, kun vinbotelo. La ĉarma an' de Epikur".

Sed nur laŭŝajna bohemo, esence li estis meditema saĝulo, klarvida observanto, kiu siajn observojn prezentis al legantoj en formo de ironio kaj satiro.

Jen kiel K. Kalocsay karakterizis liajn verkojn: "Ĉio ĉi prezentita per perfekta verstekniko, montras lin kiel simpatian bohemon, kiu havas tre sanan racion, grandan ĝukapablon pri la etaj ĝojoj de l' vivo, kompreneman ridon pri ĉiu homa

malforto, sanan ironion pri ĉio gravmiena kaj hipokrita".

Ekde 1933 R. Schwartz redaktis la monatan spiritgazeton "La Pirato". En "La Pirato" li estis vere la "terura infano" de la Esperanta familio: nenio restis kaŝita antaŭ li kaj nenion, kio estis primokinda, li indulgis. Kvazaŭ per sia spegulpeceto li eklumigis la tro verdajn flankojn de la movado.

Unua proza verkaro de R. Schwartz "Prozo ridetanta" estis eldonita en 1928. Multaj el rakontetoj de tiu ĉi libro apartenas al la plej amuzaj, plej artaj kaj bonstilaj noveloj de nia literaturo. Ĝin sekvis en 1930 mallonga romano "Anni kaj Montmartre". Ĝi rakontis pri aventuroj de orfa germana knabino, kiun la amato delogis por vojaĝo al Parizo; kie ŝi perdas lin kaj trafas en la manojn de la fripono, kiu volas devigi ŝin al la metio de stratknabinoj. Fakte, Schwartz per la "aventuroj" de la germanino priskribas tiaman vivon en tiu fama Pariza kvartalo. Lia priskribo ne entenas sentimentalnan siropon aŭ gravmienan moralpredikon; ĝi estas natura, akre trafa karakterizo, ja Schwartz akceptas la vivon tia, kia ĝi estas, kun ĝiaj krimoj, mizeroj kaj malĝojoj.

En 1949 aperis verko de Schwartz "La ĝoja podio", kiu konsistis samtempe el la poeziaĵoj kaj la prozo. La verkisto mem pri tiu ĉi verko anoncis antaŭparole: "Nur unu ambicion ĝi havas: Amuzi vin, por juste meriti sian nomon". En 1963 estis eldonita romano "Kiel akvo de l' rivero". Ĝi estas lia plej granda verko, kvazaŭ epokromano, kiu kondukis siajn heroojn de la antaŭ la unua mondmilito ĝis post la dua. La titolo esprimas la vidpunkton de la aŭtoro, ke vivo de ordinaraĵoj ĉiam havas sian neeviteblan vojon kiel la fluanta akvo de rivero kaj homo sekvas la fluon - sian sorton. Tiu ĉi verko apartenas al plej bonaj originalaj romanoj de E-literaturo.

Sub titolo "Vole-novele" en 1971 aperis novelkolekto de Schwartz. En la antaŭparolo la aŭtoro citis francan poeton kaj kritikiston Boileau, ke "en literaturo ĉiuj specoj estas bonaj, ĉiuj krom la enuiga". Kolekto "Vole-novele" enhavas 35 plezure legeblajn kaj tute malenuigajn novelojn. Nekontestebla estas valoro de multaj verkoj de R. Schwartz. Ĉi tie ni prezentas kelkajn pecojn de lia verkaro, por ke vi, karaj legantoj, povu mem konvinkiĝi en tio.

Raymond Schwartz

Esperanta Eliksiro

Ĉu vi jam konas l' eliksiron
De famkonata profesoro
Por faciligi la akiron
De nia lingvo — sen doloro?

Se ne, ĝin provu, ĉar efike
Ĝi helpas ĉiam, sen escepto,
Kaj se vi volas, mi amike
Al vi parolos pri l' recepto:

Vi ĉiutage unu glason
De tiu ĉi likvoro trinkos
Kaj vi ekscios tuj amason
Da faktoj, kiuj vin konvinkos!

L' unuan tagon jam perfekte
Vi konos nian Fundamenton,
Vi propagandos eĉ infekte
Kaj kun fervoro la Novan Senton!

La duan tagon vi senmanke
Jam sendos multkolorajn kartojn
-Kun la poŝmarko eĉ bildflanke-
En nekonatajn mondopartojn!

La trian tagon vi science
Diskutos jam pri "ujo-io"
Kaj apartenos konsekvence
Samtage al l' Akademio!

La kvaran tagon vi ver-vere
Tradukos je l' unua vido
Facilan tekston kaj fiere
Jam diros flue "Ĝis revido!"


La kvinan tagon gajmiene
Vi ekĝoĝiĝos pri l' konstato,
Ke vi komprenas jam senpene
Vortudojn de la Verda Kato!

La sesan tagon, ho amiko,
Vi venke staros ĉe la celo,
Kaj jen sur via umbiliko
Kvinpinte kreskos verda stelo!

...

Sed nun, ne trinku plu glaseton!
Vi perdus mensan ekvilibron
Kaj vi eldonus... aŭ gazeron
Aŭ nelegotan novan libron!

La Gendarmo deĵoras



Bique-la-Crotte, tiu ĉarma lorena vilaĝo, kuŝas sur ambaŭ bordoj de lace-pace fluanta rivereto, bela kiel pentrita idiljaĵo...

Tie simplaj kamparanoj vivis feliĉe sian laborplenan estadon. La sola nubeto sur blanka fono de ilia horizonto estis la ĝendarmo Dusabre, timinda reprezentanto de l' leĝoj...

...Sur sia biciklo li alvenis senaverte kiel aprila pluvo kaj malbonhumora kiel ĝi. Ĉe lia apero la vilaĝanoj sin kaŝis en siaj domoj kaj ŝtate observis lin de malantaŭ la fenestrokovriloj. La buboj sur la stratoj forgesis siajn ludojn. Eĉ la kortobirdoj timis lin kiel akcipitron kaj kluante rifuĝis al siaj nestoj. La vagantaj hundoj mistere malaperis. Nur la bovinoj, ĝenerale pli scivolemaj ol klaĉuloj, trankvile daŭrigis sian vojon al la paŝtejo kaj neniel okupiĝis pri la ĝendarmo, kvazaŭ li estus simpla samfamiliano.

...Tiu julia posttagmezo estis tiel preme varma, ke la vilaĝanoj inter si babilis kun malica rideto:

"Nu, hodiaŭ ni povas esti trankvilaj — mi ne kredas, ke Dusabre forlasos la ombbron de sia ĝardeno."

...Des pli doloriga estis la streviĝo de l' tuta vilaĝo, kiam kelkaj infanoj ludintaj ĉe l' ponto anoncis:

"La ĝendarmo venas!"

Vere, sur sia biciklo Dusabre alproksimiĝis. Sed li strange zigzagis kaj nur pene sin tenis sur la du radoj.

"Ah, la kretano!" Cantail indignis, "li estas ebria kiel dek porkoj!"

...Kaj hodiaŭ la vilaĝanoj sin ne kaŝis. La infanoj sekvis la ĝendarmon, en respekta distanco, kompreneble. La kokinoj daŭrigis la serĉadon de frandaĵoj sur la sterko. La hundoj de la vilaĝo restis senĝene antaŭ la stalo de Mangin, kie tro arda hundino troviĝis enŝlosita. Nur la bovinoj jetis sur la ĝendarmon riproĉan rigardon, kvazaŭ ili hontus pri tiu parenco.

Ganumet, kiu forgesis pagi sian lastan protokolon kaj kiu tial ĝuste supozis, ke la vizito de l' ĝendarmo ne estas tute sencela, kun kamparana ruzo sin turnis al Dusabre:

"Bonan tagon, sinjoro ĝendarmo. — Diable varma vetero hodiaŭ, ĉu ne?" "Ĉu vi prenos glaseton da cidro? Bonvolu eniri!"

"Nu, se nepre devas esti," la ĝendarmo ŝmacis, "sed tute malgrandan glaseton, nur por fari al vi plezuron..."

Intertempe oni rondiris en la vilaĝo, ke la ĝendarmo Dusabre akceptis trinki ĉe Ganumet. Tuj ĉiuj

vilaĝanoj, kies konscienco ne estis tute en ordo, opinis la okazon taŭga por akiri favorojn de l' severa ĝendarmo.

Tiel fariĝis, ke, elirinte el ĉe Ganumet, la sofa ĝendarmo devis doni sian juĝon pri diversaj brandoj sinsekve ĉe dek aliaj kontraŭ la leĝo pekintoj. Li estis ĉarma, gaja, babilema kaj ĉiufoje, kiam la ruzaj gastigantoj tuŝetis la konflikton, li signife fermis ambaŭ okulojn kaj pardonis. Li ĉirkaŭbrakumis la virojn, kaj kun larva voĉo sentencis: "Cantail, vi estas frato!" aŭ: "Dubois, vi estas simpatia tipo!" dum la virinoj, pli ŝerce ol prude, evitis tro avidan palpemon de liaj fingroj.

Jam eknoktiĝis, kiam la ĝendarmo finis sian "inspektaadon". Li apenaŭ povis stari sur siaj kruroj, kiuj ŝajnis al li kaŭĉukaj. Rondel, kaŝe ridetanta, alkondukis la biciklon. Mangin kaj Dubois plej helpeme levis la ĝendarmejon sur la selon. Tiam Rondel per forta puŝo antaŭenpelis la biciklon. Mole la kruroj de Dusabre sekvis la movon de l' pedaloj dum li senespere sin akroĉis sur la direktilo. Tamen, li progresis, hezite, zigzage, kaj estis miraklo, ke li ne jam kuŝis en la ĉevoja fosajo. La tuta vilaĝanaro kun nekaŝebla ĝojo observis liajn akrobataĵojn. Sed jen la vojo iom krute kliniĝis al la ponto. La biciklo subite plirapidigis sian kuron kaj frakasige sin jetis kontraŭ la pontomuro...

... La vilaĝanoj ne plu ridis. Se okazis grava malfeliĉo, ĉu ili ne ĉiuj estis iom kunkulpaj, puŝinte al pludrinko homon jam ebrian? Ili rapide akuris.

"Jen ni havas la feston!" Mangin unua konstatis, "necesas lin hejmenporti senprokraste kaj venigi kuraciston."

... Ĉiuj samtempe pensis pri Vautrin, la porkovendisto, kiu posedis aŭtomobilon.

Vautrin kompreneble ne povis rifuzi tiun servon. Helpopreta li alvenis, ŝarĝis la senkonscian ĝendarmon sur sian aŭtomobilon kaj senplue forveturis al la hejmo de Dusabre...

Li brave faris sian ebilon. Jam post kelkaj minutoj li haltis en la proksima vilaĝo antaŭ la ĝendarmejo. ...Tiam Dusabre ekvekiĝis el sia svena dormo.

"Haltu," li flustris malforte sed ordone al la portantoj, "al kiu apartenas tiu aŭtomobilo?"


"Al mi," respondis Vautrin, kaj por esti pli certa, ke la ĝendarmo memoros lian helpon, li aldonis:

"Vi ja konas min, ĉu ne? — Mi estas Vautrin, el Bique-la-Crotte."

"Ha, mia bonhomo," la ĝendarmo pene blovis, "via konto estas tute preta. Mi instruos al vi veturi dumnokte sen lanternoj!"

Vautrin intencis klarigi la situacion, sed la ĝendarmo streĉinte siajn lastajn fortojn akre tranĉis:

"Ne, sinjoro, oni ne subaĉetas min. Mi protokolas!" — kaj tion dirinte li ree perdis la konsciencan.



Bildoj de Bill Thorne

Sut tiuj ĉi paĝoj ni publikigas tradukajn verkojn de niaj konstantaj aŭtoroj el diversaj landoj. Ĉiujn tiujn verkojn unuigas filozofia vivrigardo al la vivo, al ĉirkaŭanta mondo, al rilatoj inter homoj kaj Naturo.

El la germana tradukis **Vladimir Opletajev** [Surgut, Rusio]

Vi estas pli feliĉa ol...

Se la tuta loĝantaro de nia planedo estus reduktita ĝis 100 homoj, kiuj loĝus en unu vilaĝo, la vilaĝano — kun atento al procenta kvoto de ĉiuj nun ekzistantaj popoloj — estus jene prezentita: 57 azianoj, 21 eŭropanoj, 14 amerikanoj (nordaj kaj sudaj), 8 afrikanoj. Inter ili estus 52 virinoj kaj 48 viroj, 70 brunhaŭtaj kaj 30 blankhaŭtaj loĝantoj, 70 nekristanoj kaj 30 kristanoj.

Ses teranoj posedus 59% de la tutaj mondriĉaĵoj, kaj ĉi tiu sesopo devenus el Usono. Okdek personoj ne havus kontentigajn loĝkondiĉojn, sepdek estus analfabetaj. Kvindek homoj nutrus sin nesufiĉe, unu mortus, du naskiĝus. Nur unusola el la centoj da vilaĝanoj posedus komputilon, kaj ankaŭ nur unu persono estus akademie edukita. Kiu rigardas la mondon el ĉi tiu vidkampo, tiu povas konvinkiĝi pri graveco de integriĝo, komprenemo, toleremo kaj edukado. Konsciu tion:

Se vi estas hodiaŭ sana kaj vekiĝis bonfarta, vi estas pli feliĉa ol unu miliono da homoj, kiuj ne transvivos la sekvan semajnon.


Se vi neniam spertis iun militon nek izolitecon pro malliberigo, ne suferis pro torturoj aŭ malsato, vi estas pli feliĉa ol 500 milionoj da homoj en tiu ĉi mondo.

Se vi povas viziti preĝejon kaj ne timi, ke oni atencos vin, arestos aŭ murdos, vi estas pli feliĉa ol tri miliardoj da homoj de la mondo.

Se vi havas en via malvarmigilo ion por manĝi, vi estas vestita, posedas tegmenton super la kapo, inkluzive de lito por trankvile dormi en ĝi, vi estas pli riĉa ol 75% de ĉiuj loĝantoj de la mondo.

Se vi havas bankan konton, iom da mono en la poŝo kaj apunton en monujo, vi apartenas al 8% de bonstataj homoj de tiu ĉi mondo.

Se vi povas legi ĉi tiun tekston, vi povas esti feliĉa, ĉar vi ne apartenas al la kvar miliardoj da homoj, kiuj ne scipovas legi!



Sadretdinova Naila
[Voronej, Rusio]

Erich Fried

Tradukis **Cezar** [Aitenburg, Germanio]

La perforto

La perforto ne komenciĝas
 Se iu sufokas iun per la manoj.
 Ĝi komenciĝas
 Se iu diras:
 "Mi amas vin:
 vi apartenas al mi!"

La perforto ne komenciĝas
 Se oni mortigas malsanulojn.
 Ĝi komenciĝas
 Se iu diras:
 "Vi estas malsana:
 vi devas fari, kion mi diras al vi."

La perforto komenciĝas
 Se gepatroj regas siajn obeantajn infanojn
 Kaj se papoj kaj instruistoj kaj gepatroj
 Postulas sinregadon.

La perforto regas tie
 Kie la ŝtato "diras":
 "Por kontraŭbatali la perforton
 ne plu devas esti perforto
 krom MIA perforto."

La perforto regas
 Kie iu
 Aŭ io
 Estas tro alta
 Aŭ tro sankta
 Por plia kritiko
 Aŭ kie la kritiko ne rajtas fari ion
 Sed nur paroli
 Kaj la sanktuloj kaj gravuloj
 Rajtas fari pli ol nur paroli.


La perforto regas tie, kie oni diras:
 "Vi rajtas uzi perforton",
 Sed ofte ankaŭ tie kie oni diras:
 "Vi NE rajtas uzi perforton."

La perforto regas tie
 Kie ĝi enprizonigas siajn kontraŭulojn
 Kaj kalumnias ilin
 Kiel instigantoj de perforto.

La baza leĝo de perforto estas:
 "Rajto estas kion NI faras.
 Kaj kion la aliaj faras
 Tio estas perforto."

"La perforton oni eble neniam
 Povos venki per perforto
 Sed eble ankaŭ ne ĉiam
 Sen perforto.

Kononova Snejana | Nijnjaa Omka, Rusioj



El "Paroloj de Indianoj" tradukis **Ginette Martin**
 [Saulxures/Moselotte, Francio]

Gemoj de la tero

La Blankuloj ofendas la teron, la damaon aŭ la urson. Kiam ni, Indianoj, ĉasas beston, ni manĝas la tutan viandon. Kiam ni konstruas niajn domojn, ni faras malgrandajn truojn. Kiam ni elfosas radikojn, ni faras malgrandajn truojn. Kiam ni bruligas herbon pro la lokustoj, ni ne damaĝas ĉion. Ni skuas la glanojn kaj la pin-konusojn. Ni uzas nur mortintan lignon. La blankulo -ve !- renversas grundon, hak-faligas arbojn, detruas ĉion. La arbo diras: "Haltu, mi estas vundita, ne suferigu min" , sed la blankulo hakas ĝin kaj dispecigas ĝin. La Spirito de la Tero abomenas lin. Li elŝiras arbojn kaj tremigas ilin ĝis radikoj. Li segas arbojn. Tio suferigas ilin. Indianoj neniam faras malbonon, kaj la blankulo, tute male, frakasas ĉion. Li eksplodigas rokojn , kaj lasas ilin disaj sur la grundo. La roko diras: " Haltu, vi suferigas min" , sed la blankulo ne atentis pri tio. Kiam Indianoj utiligas ŝtonojn, ili prenas ilin malgrandaj kaj rondaj, por fari, inter ili , sian fajron....

.....
 ... Kiel la Spirito de la Tero povus ami la blankulon?... Ĉie, kie li tuŝas ĝin, li postlasas vundon.

Misoj

MIS - la prefikso diras pri eraroj.
Obsedas nin misagoj kaj misfaroj.
Dum mia viv' mi ofte miskondutis,
mispasis, misakuzis, missalutis,
misskribis, mispromesis kaj misamis.

La vivon mi misuzis kaj eltrivis...
Do, mi neniam vivis sed misvivis.
Amikoj, tamen antaŭ mia diso,
por ke ĝi ne estu definitiva,
mi revas pri ankoraŭ unu "miso":
Ke mi mismortos, do mi restos viva!

*

Elektis speciale por tiu ĉi paĝo nia kontribuanto
el Germanio **Cezar**

Verkis **Mikaelo Giŝpling**

Mikaelo Giŝpling esperantistigis en la jaro 1943. Rusiano kaj sovetiano, nun izraelano. Inĝeniero- kemiisto. Fondinto kaj gvidinto de la junulara "Fajrero" en Moskvo, en 1957.



Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]

Instruaj versoj pri prefiksoj
kaj sufiksoj

1

Dum bela vetero nin logas la strat',
Dum **mal**bela restas ĉe forno eĉ kat'.

2

Geviroj, virino kaj vir'. La prefiks'
ge montras personojn en dusekŝa miks'.

3

La patro de mia edzino, pri li
ni diras, li estas **b**opatro de mi.

4

Prahomoj loĝadis en roka kavern',
en kiu dumnokte ne estis lantern'.

5

Ek estas komenco de iu ajn far',
sin levi de seĝo do estas **ek**star'.

6

Re estas ripeto, inverso de mov':
Ekzemple, **re**vido, **re**iro, **re**trov'.

7

Dis montras partigon: **dis**falo, **dis**ŝir';
diversajn direktojn, **dis**kuro, **dis**ir'.

8

Malbona ludanto, ĉar mankas talent'
misuzas pianon, terura turment'.

9

Fihomo, se regas morala difekt'.
Homa**ĉo**, se tedas malplaĉa aspekt'.

10

Re**ĝ**ido - infano de re**ĝ**' kaj re**ĝ**in',
Kok**id**o - la **id**o de kok' kaj kokin'.

11

Metio kaj ofta okupo per **ist**,
ekzemple, ŝu**ist**o kaj esperant**ist**'.

12

-et malgrandigas, grandigas la **-eg**,
tre plaĉas buŝ**et**o, sed ne la buŝ**eg**'.

13

Por faro, laboro, nin servas la **-il**;
por ludi - lud**il**o, por kudri - kudr**il**'.

14

La **-uj** kovras tute, nur parte la **-ing**;
do cigared**u**jo kaj cigared**ing**'.

...

El "Gaja Ekzerco kaj Amuzo" de **Carl Walter**.
daŭrigo en la 6-a kajero de "K"

LINGVAJ RESPONDOJ

L. L. Zamenhof

Pri la apostrofado de la artikolo

La esprimo "reunuiĝi" l' homaron" estas efektive nebona, ĉar apostrofi la artikolon oni povas nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo. Sed la neobservado de tiu ĉi regulo, kiu estis donita *ne en la gramatiko*, sed nur en la "Ekzercaro" (\$27), estas *ne eraro*, sed nur peko kontraŭ *boneco de la stilo*. Sekve en *prozo* tiu ĉi regulo devas esti observata, sed en *versoj*, kie pro "licentia poetica" oni ofte permesas al si deflankiĝojn de la ordinara stilo, la neobservado de la supre donita regulo (aŭ pli ĝuste *konsilo*) ne estas eraro. En versoj ni devas nomi "eraro" nur deflankiĝojn de la *gramatiko* (ekzemple la apostrofado de adjektivo, uzado de diversaj kontraŭgramatikaj formoj k.t.p., kio estas tre ofte rekonata ĉe la komencantaj esperantaj versistoj).

Respondo 4, *La Revuo*, 1906, Decembro

Pri "ujo" kaj "ingo"

S-ro Fruictier klarigis al mi, ke, laŭ D-ro Zamenhof, *ujo* estas vazo aŭ kesto aŭ io simila, kiu entenas la tuton, kaj *ingo* entenas nur *parton*.


Carlo Bourlet
Lingvo Internacia, 1904, p.170



Pri la deveno de la vorto "edzo"

Dank'al la afableco de S-ro D-ro Zamenhof, mi ricevis la solvon de tiu malgranda enigmo... La vere primitiva formo estas *ne edz*, sed *edzin*, de kiu devenas la formo *edzo*. Tiel same *fraŭlino* devenas de *fraŭlino*, *kuzo* de *kuzino*, kaj *feo*, kiun oni povus uzi, por montri fablan estulon, ekz. Oberono, kaj kiun oni povas devenigi de *feino*. La vorto *edzino* estis primitive sufikso, kiu poste fariĝis sendependa de la radikoj, al kiuj ĝi estis primitive aldonita. Jen kiamaniere la Majstro klarigis al mi la aferon: En la germana lingvo, reĝido heredonto de la krono estas nomata *Kronprinz*, kiu fariĝas en Esperanto *kronprinco*. La virino kunigata kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane *Kronprinzessin*. Ĉi tiun lastan vorton D-ro Zamenhof transskribis Esperante *kronprincedzino*, kaj li tuj rimarkis, ke la finiĝo de tiu vorto, t.e. *edzino*, ricevis per si mem la senco de virino kunigata kun viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto: unue, ĝeneralan sufikson esprimantan difinitan rilaton, kaj due, vorton memstaran kun tiu sama signifo. Poste el la vorto *edzino* li tute logike devenigis la vorton *edzo*.

Laŭ artikolo de Emile Boirac
Oficiala gazeto, 1913, Decembro



Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]


Pri la prefikso GE

La prefikso *ge* rilatas ne sole al *du* personoj, sed ĝi povas rilati ankaŭ al *multaj* personoj; ĝi signifas simple "de ambaŭ seksoj". Mi persone ĝis nun uzadis tiun ĉi prefikson ĉiam nur por esprimi ian *ambaŭseksan familian tutaĵon el personoj starantaj en la sama linio de parenteco*; tiel mi diradis ekzemple "gepatroj", "gemastroj", "gefratoj", "genepoj", "gekuzoj", "getajloroj" (en la senco de "tajloro kaj lia edzino"); sed mi neniam esprimis ekzemple per "getajloroj" la tutan familion de tajloro, ĉar la gefiloj de tajloro ne staras en la sama linio de parenteco kun la tajloro, kaj mi ankaŭ evitadis diri "gesinjoroj" pri personoj, kiuj ne apartenas al unu familio (mi nomadis ilin "sinjoroj kaj sinjorinoj"). Tamen... en la fundamenta (universala) vortaro de nia lingvo *ge* signifas simple "de ambaŭ seksoj"... tial ni povas tre bone uzi tiun ĉi prefikson en *ĉiuj* okazoj, kiam ni parolas pri ambaŭ seksoj. Sekve, se al personaro, kiu konsistas el ambaŭ seksoj, iu sin turnas kun la vorto "gesinjoroj", li faras nenian eraron, kaj eble mi mem ankaŭ de nun iafoje uzados la prefikson en tiu ĉi senco.

Respondo 6,
La Revuo, 1907,
Februaro

Bildoj de infanaĝo Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]

Tjulafov Spartak [Ulus Orosu, Jakutio, Rusio]



Kiel diris iu famulo, ni ĉiuj devenas el infaneco, el tiuj jaroj, kiam la mondo vidiĝas al ni granda kaj mistere sorĉita. Sed ankaŭ plenkreskinte, ni ŝate dorlotas bildojn el nia infanaĝo konservante ilin en la memoro kiel la plej karajn trezoraĵojn neforgesindajn. Kial do enrevo kaj enpense ni ofte revenas al niaj unuaj paŝoj faritaj senzorge sur tiu ĉi Tero? Kial ni strebas reale post jardekoj reveni ankoraŭfoje en tiun anguleton de la mondo, kie ni travivis la plej iluminajn infanajn emociojn kaj aventurojn? Malantaŭ ĉi tiuj demandoj kaŝiĝas respondo, ligita kun la plej sekretaj kaj intimaj impresoj akiritaj de ĉiu homo individue. La bildoj de infanaĝo, kiel fekundaj spuroj postlasitaj en la animo, formas niajn perceptojn kaj signas nian longan vojon tra la matura vivo senevite revenigante nin al vivigaj fontoj de la origino.

Kiam mi retrofoliumas paĝojn de miaj jaroj, mi ofte vidas min kiel knabeton en la areto inter similaj vilaĝaj samaĝuloj ĉiupaŝe inventemaj kaj konstante obsedataj de petolaj fantaziaĵoj. Nia reala vivospaco ne limiĝas nur per kortoj, staloj, ludplaceto kaj

legomĝardenoj, sed ĝi etendiĝas ĝis tre malproksimaj arbaraj riverejoj kaj apenaŭ atingeblaj sekretaj anguletoj aŭ boskoj ĉirkaŭataj de sovaĝaj gresejoj. En la daŭraj esplormarŝoj la knaban taĉmenton konstante akompanas du aŭ tri kvarpiedaj amikoj — senrasaj kortaj hundoj, kiuj fidele gardas nian sekurecon sur kaŝitaj padoj inter ombraj densejoj. Niaj scioj kaj spertoj pri la ekstera mondo fontas el ĉi-tiuj marŝoj kaj scivolemaj observoj, konkretigantaj per bildigaj faktoj leĝojn kaj interligojn, ekzistantajn en la naturo.

Jen mi vidas nian kohorteton paŝi sur preskaŭ nevidebla vojeto en la altega apenaŭ trairebla kanaro preter la bordo de la arbara lemnokovrita lageto dense ĉirkaŭkreskata de kareksoj kaj ekvizetoj, inter kiuj videblas flavaj koroloj de trolioj. La lageto estas hejmo por kelkaj familioj de platbekaj anasoj. Printempe ni trovis iliajn nestojn plenajn de elkovendaj ovoj, kaj nun, post la misteraj metamorfozoj, el la ovoj trabekis al si eliron la nova vivo de gajaj brunlanugaj anasidoj. Ni admire gvatas ilian vice ordigitan persistan kro-

zadon post la patrino instruanta ilin pri plonĝoj kaj aliaj anasaj artoj. Imitante la anasinojn ili provas ridinde kaj ne tre lerte moveti siajn senfortajn flugilojn. Ĉiutage la vivo malkovras al ili sekretojn tre bezonatajn en la senkompata kaj kruda realo, sed dume ni ĝoje akceptas ilian sennuban ekziston aŭspiciatan de la senlaca patrino protekto.

Aparte ni ŝatas viziti boskon de padusarboj. Kiam ili abunde floras printempe kaj ornamas sin per blankaj panikloj eligantaj ĉirkaŭe neripeteblan kapturan odoron, ili sugestas al ni la revindan surteran paradizon, kiu almenaŭ por kelkaj tagoj en la jaro ekestas kiel blanka mirinda tapiŝego en arbaro malantaŭ nia siberia vilaĝeto. Ni alportas hejmen buketojn da florantaj branĉoj, kaj dum tagoj en la domoj regas printempa fabelo. Malfrusomere ni revenas en ĉi tiun boskon por grimpi sur arbojn kaj ŝiri nigrajn sukajn berojn, kiuj forte agacas la langon, sed pro la specifa gusto frandigas nin, ĝis ankaŭ niaj fingroj kaj lipoj fariĝas nigrakoloraj. Kvazaŭ integre neelimineblaj eroj de la naturo ni delikate rilatas al ĝi, harmonie vivas en ĝia sino sen damaĝi ĝiajn plej etajn elementojn, kaj ĉiusezone ni estas malavare regalataj de nia patrono per ne ĉiam rafinitaj sed loge gustaj arbaraj fruktoj.

Forlasante la arbaron ni kuras kutime laŭ la pado preter alta sekiĝinta arbo sur kies pinto inter branĉetoj nestas somere agloj. Ilia nesto similas al grandega plektita korbo, kaj sur ĝia bordero konstante gardodeŝoras unu birdo, atente observanta ĉirkaŭaĵojn, dum alia ĉasas glisante ie en la subnuba altaĵo. Kiam la aglo ventumas siajn plumojn kaj vaste disfaldas la grandegajn flugilojn super la nesto, al ni ŝajnas, ke ĝi pretigas sin por ataki nin, kaj, timigita de neekzistantanta minaco, nia grupeto fulme foriĝas el la kampo, cedante ĝian kvieton al prizorgo de fiere memfida agla paro.

Dum horoj ni sidas sur la bordo de granda profunda lago kun pura akvo, en kiu abundas fiŝoj, kaj en kvietaj posttagmezoj ni vidas voremajn ezokojn peli plotidojn, kiuj eskapante la akran abomenan dentaron de la rabofiŝoj subite elakviĝas saltante tra la aero kaj kiel arĝentaj saĝetoj tuj malaperas en la akva elemento. La vivo daŭras konforme al siaj naturaj leĝoj, kaj ili ne ĉiam estas mizerikordaj rilate al malpli grandaj kaj malpli fortaj.

Nian pli viglan intereson vekas la vivo de ondatroj. Tiu ĉi akva rato, posedanta molan varman felon de helbruna koloro, estas dezirata objekto de ĉasistoj. Tial ĝi kutimiĝis al esotera kaj singarda vivmaniero, ĉar krom fiŝistaj retoj kaj senkompate avidaj raboĉasistoj ĝi ne havas aliajn minacojn en la naturo. Estas strange, sed feliĉokaze en nia vilaĝo neniuj ĉasistoj adoras ondatrajn felojn, kaj la komike senpaciencaj kaj mastrumemaj bestetoj senriske enloĝigas la distan kaj malpli profundan parton de la lago. Ili konstruas tie duetaĝajn dometojn el branĉoj, bastonoj, herboj kaj radikoj kun la subakva eniro kaj la komforta nesto super la akva nivelo, kie oni povas sekure pasigi la frostan vintron. Observante ilian tumulton, ni kun miro konstatas racian organizitecon en la ondatra societo, ĉar krom ludoj kaj ripozo ili provizas nutraĵojn, revizias kaj riparas siajn dometojn, edukas infanojn kaj faras ekspediciojn laŭ nur al ili konataj kanaloj ĝis apudaj lagoj. La klopodema rata popolo ŝajnas al ni esti elokvente bildiga modelo de labora sindonemo komparebla kun tiu de homoj el nia vilaĝo, kiam ili tutsomere plugas, semas, rikoltas kaj falĉas kaj faras aliajn urĝajn kaj necesajn laborojn.

Subite el post blankaj kumulusaj montoj aperas en la ĉielo malhela, rapide proksimiĝanta nimbuso. La birdoj ĉesas tuj kviviti kaj serĉas kontraŭpluvan rifuĝejon en foliaro aŭ arbaj kavernoj. Ankaŭ ni ekkuras al kampo, kie altiĝas gigantaj maljunaj poploj videblaj de ĉiuj direktoj kiel vojsignaj lumturoj, kiuj povus nin kovri de ne daŭra sed forta pluva torrento. Maljunuloj asertas, ke la varma somera pluvo, akompanata de la hela sunbrilo, aŭguras abundajn fungojn rapide ĝermontajn post la bona ĉiela aspergo. Kompreneble, ni ĉiuj deziras kreski pli rapide, ne malpli rapide ol fungoj, kaj ni ĝoje sentas pluvgutojn frapi sur niajn ŝultrojn. Kiam ni atingas finfine la subkronan sekejon ĉirkaŭ la arbotrunkoj, ni aspektas kiel mizeraj kokidoj ĝishaŭte banitaj de la impeta torrento. Sed la malsekaj vestoj neniun ĉagrenas, ĉar antaŭ niaj okuloj mirakle aperas en la humida postpluva aero grandega ĉielarko, tiel reala kaj intense kolora, kvazaŭ ĝi estus magia ponto liganta nin kun ankoraŭ nekonata sed loga estonto.

Kiam mi enpense revenas en mian infanecon, ĝuste ĉi tiu bildo el multfaceta kalejdoskopo de travivaĵoj estas la plej kara. Mi vidas min kaj miajn malgrandajn amikojn gaje kapriolantaj sur la freŝe pluvlavita herbejo inter la maljunaj poplaj gigantoj, kaj super niaj kapoj fleksas sin grandega arko de superbaj formo kaj koloro surfone de la profunda ĉiela lazuro. Tiuj ĉi bildoj ne plu ripetiga en la vivo, sed ili restas en la arkivoj de nia memoro, por ke ni povu post multaj jaroj travivi ilin ankoraŭ plurfoje en la minutoj de ĝojo kaj tristo.

Neelpensitaj historioj

Leksina Ludmila [Sudĵa, Rusio]

La karesa nomo

"Kia frostego!" — pensis mi, sentinte la malvarmon sub la felo de la pelto. Estis frua vintra mateno. Mi iris laŭ digo trans la marĉo.

Subite dekstre, kie estis la frostigita lago kaj malantaŭe domoj kaj ĝardenoj de la apudurba vilaĝo, mi ekvidis virinon sur la glacio de la lago.

Ŝi iris al la digo kaj vokis: "Lastoĉka!", "Lastoĉka!"

Tuj maldekstre aŭdiĝis plenda "Mu-u-u!" kaj el densejo de kanoj elkuris la granda timigita bovino.

Evidente tia malsaĝa bovino vespere foriris promeni, perdis la vojon kaj ĝis la mateno vagis sur la frostigita marĉo. Kaj la virino serĉis ĝin.

Mi iris plue, pensinte pri nomo "Lastoĉka", kiu ruse signifas "hirundo". La bovino, nomita hirundo... Ĉu la bovino similas birdon?

"Ne. Ĉi tie estas alie, - konkludis mi. — Tiel oni nomas ne nur ĉi tiujn birdetojn, sed ankaŭ amatajn virinojn, filinojn, nepinojn kaj eĉ amatajn bovinojn, ĉar "lastoĉka" gramatike signifas "karesema" kaj "karesinda". Krom tio ĉi tiu vorto havas ankaŭ tiel nomatan "karesan sufikson" "oĉk". Rusa lingvo havas multajn karesajn sufiksojn.

Bedaŭrinde, ke similajn ne havas Esperanto. Sed esperantaj sufiksoj estas ankaŭ esprimplenaj. Ekzemple, unu malgrandan katinon kun granda apetito mi nomas Mangemulineto. Kvar sufiksoj. Kiu elpensos pli multe?



Santi Elena Bullo [Messure, Italio]

Neniam la mondo povas pardoni al tiuj, kiuj havas neniun kulpon.
Stanislaw Jerzy Lec, pola lirikisto kaj satiristo, 1909-1966

AFORISMOJ

El Germana gazetaro kolektis kaj esperantigis **Cezar** [Altenburg, Germanio]

Kverelo inter negocaj partneroj estas pli terura, ol eksedziĝo.
Gerd Bucorius, germana eldonisto, 1906-1995

Jam la matematiko montras, ke oni ne neglektu la nulajn.
Gabriel Laub, pola-ĉeĥa verkisto, nask. 1928


Erinaco estas la bildo de armita paco.
Wilhelm Busch, desegnisto kaj verkisto, 1832-1908

Fantazio estas pli grava ol scioj.
Albert Einstein, germana fizikisto, Nobel-premiito, 1879-1955

Profesio estas la spino de la vivo.
Friedrich Nietzsche, germana filozofo, 1844-1900

Se iu sole songas, restas songo. Sed, se ni ĉiuj kune songas ĝin, jen ĝi fariĝos reala.
Helder Camara, brazila teologo, nask. 1909

Mi dissekciis tiom da mortintoj, sed animon mi vidis neniam.
Rudolf Virchow, germana patologo, 1821-1902



Astafurova Vera [Samara, Rusio]

Boguslaw Sobol
 [Milańówek, Pollando]

Originale verkitaj Epigramoj

Si estas fiera pro vizaĝo
domaĝe, ke ne pro
saĝo

Pri amo li bele parolas
sed gastojn akcepti ne
volas

Specialisto li estas je
unua klaso
nur pri kirasa kaso

Kvankam kliento pravas
vendista voĉo gravas

Pro malriĉeco ĉiam li
plendas
sed novajn aŭtojn ĉiam
li mendas

Nek juĝejon, nek
kritikistojn
timas tiu politikisto

Jakovleva Elena [Arĥangelsk, Rusio]

Civilizacio estas senfina akumulado
de necesaj aĵoj.

Sulkoj nur indikas lokojn, kie antaŭe
estis ridetoj

Mark Tven

La plej bona maniero amuzi aliajn
homojn estas sidi kaj aŭskulti iliajn
rakontojn.

Habbard Kin

N.Saldin [Ekaterinburg, Rusio]

Frazoj

Malapero de enspezoj kondukas al
malapero de elspezoj.

Mia modesteco estas senlima kiel
Universo.

Mi kredas, se el iu libro oni prenis
almenaŭ unu utilan konsilon, ĝi estis
aĉetita ne vane.

**Boguslav Sobol**

[Milanovek, Pollando]

Ŝi:

- Ĉu vi devas ĉiutage ĝis la dua nokte sidi en drinkejo?

Li:

- Ne. Mi tion faras libervole

*

- Paĉjo, domu al mi du zlotojn, ĉar mi volas rigardi lunon pere de teleskopo.
- Atendu fileto! Post du semajnoj estos plenluno kaj vi ekvidos pli multe kontraŭ la sama mono.

Kuracisto al paciento:

- Ĉu vi drinkas?
- Kaj vi ion havas?

*

- Oh karulo, vi estis tiel ebria, ke vi eĉ ne scias, ke vi falis.
- Jes. Mi aŭdis, ke io falis, sed mi ne sciis, ke estas mi.

*

Konfesprenanto vizitas en malliberejo ŝteliston.

- Ne ĉagrenu, kiam vi foriros mi helpos al vi.

- Dankon, sed mi timas, ke tiu ĉi tasko estos por la pastro malfacila. La ŝtelista profesio postulas multe da sperto kaj sprito.

*

- Kial via edzo ne vizitas jam nian restoracion?

- Mia edzo mortis.

- Kaj mi jam pensis, ke li ofendiĝis pro iu malbongusta manĝaĵo.

Palkin Andrej [Nekrasovo, Rusio]

- Mi vidas, vi havas gitaron, sed neniam ludas ĝin. Kial?

- Ĉar gitaro havas 6 kordojn, sed mi nur 5 fingrojn!

- Ho, mi tiam imagas, kiaj monstroj ludas pianon!

Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

- Mi havas strangan malsanon: mi mem al mi skribas leterojn. Hodiaŭ matene sendis la lastan...

- Kaj kion ja vi tie skribis?

- Dume ne scias. Jen, ricevos - tra legos.

*

- Ni kun la edzino estis feliĉaj dum 20 jaroj.

- Kaj poste?

- Kaj poste ni konatiĝis kaj edziĝis.

*

- Mi ĉiam metas en la poŝon papereton kun indiko de mia adreso, ke okaze de troebrio oni povus min liveri hejmen.

- Kaj kion vi tie skribas?

- Parizo. Bulvardo Monparnas...

- Sed vi loĝas en Arĥangelsk!

- Jes, en Arĥangelsk, sed foje tamen oni veturigis min en Parizon...

Grigorij Arosjev, [Moskvo, Rusio]

Kiel vi povas klarigi vian sorton per blato

*/ daŭrigo. komenco en la 4-a numero /***Nun mezuru la blaton**

Se la blato estas longa malpli ol 1 centimetro - vi estas homo kiu fidelas al sia familio.

Se la blato estas longa pli ol 3 centimetroj - vi estas homo serĉema.

Se la antenoj de la blato estas pli longaj ol via nazo - vi estas homo scivolema (ĉar mezuris liajn antenojn kompare kun via nazo).

Se unu anteno de la blato estas pli longa ol la alia - vi ne jam realigis kaj aplikis ĉiujn viajn kapablojn kaj talentojn.

Se la suma longeco de la blataj antenoj egalas al longeco de lia korpo, obligita je la kvadrata radiko de diametro de ĝia ventro kaj dividita je la logaritmo de la kvanto de ĝiaj gamboj - vi estas skrupula kaj EGE scivolema homo (eble vi estas sciencisto).

Se la gamboj de la blato kreskas el ĉiuj partoj de ĝia korpo - por esti tute certa vizitu vian psikiatron.

Se la longeco de la blato egalas al ĝia larĝeco - tio estas cimo.

Jakovleva Elena [Arĥangelsk, Rusio]

Du ŝakludantoj ludas ŝakojn:

- Tiel ne eblas "paŝi". Mi ja forprenos de vi la Reĝon!

- Prenu. Mi proklamos respublikon kaj ludos plu.

*

Laboro de programisto kaj laboro de ŝamano havas multon komunan. Ambaŭ prononcas nekompreneblajn vortojn, faras nekompreneblajn agojn kaj ne povas ekspliki, kiel tio ĉi funkcias.

**Perevalov Jurij** [Lesnoj, Rusio]

Materialoj, kiujn ni prezentas sub tiu ĉi rubriko, sendis niaj legantoj el bela lando Italio. Ĉi tie ni citas kelkajn liniojn el letero de s-ro **Antonio Gambuti** [Savignano sul Rubicone, Italio] rilate al itala kanto, tutmonde konata, kiun li sendis al "K".

"Pri "Sankta Luĉia": ĝi estas tre konata tutmonde kiel Napola kanto. Mi trovis kelkajn tradukaĵojn trafajn, sed ili ne tro plaĉis al mi. Do mi el tiuj diversaj tradukaĵoj aranĝis la jenan tekston dekstroflan (anstataŭ 4 strofoj!).

La nuna teksto pli bone spegulas la italan tekston laŭ leksiko kaj laŭ la rimoj (nur la longeco estas eksterordinara!).

Napola kanto

Surmare brilas stel el arĝento,
dolĉe favoras ondo kaj vento.
Venu, atendas barketo mia.
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Maro, venteto ambaŭ ridetas.
Nia barkisto zorgojn forĵetas.
Dancas la barko kvazaŭ folia.
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Vento blovetas milda suronde.
Nu, pasaĝeroj, venu enronde.
Lumas la luno pale radia.
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Sankta Luĉia

Mi vin invitas; venu do, kara,
por promenado bela surmara.
Ĝuu la horon, estu konscia!
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Venas la nokto, ni kantos kune.
Nokta vualo nin kovras nune.
Logas pejzaĝo plej idilia.
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Kial vi haltas? Belas vespero.
Pure, varmete blovas aero.
Nokta silento plej harmonia.
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Venu, nu venu al barko mia.
Brilas ĉiele stelaro Dia.
Ni kantu kune per voĉo nia:
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Ho, dolĉa Napoli, tero benata
de ĉiu homo tre admirata,
vi senkompara bel harmonia.
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Ravas la urbo, floro ĉiela,
kvazaŭ sorĉita sonĝo fabela
ŝajnas ĝi esti rideto Dia.
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!

Neforgesebla ĝojplena horo
vivu eterne en nia koro!
Kanto sopira kaj nostalgia:
Sankta Luĉia, sankta Luĉia!



Santi Elena Bullo
[Mestre, Italio]

Venecio

Estas mia urbo-konko
El ŝtonoj kaj oro
Kiun ĉirkaŭbrakas
Kvieta verda akvo.
Kiam brilas la suno
Briliĝas la laguno
Per mikraj lumoj.
Sed kiam naskiĝas la luno
Ĉion mirinde ĝi kaŝas
Per blanklakta koloro.
Tiam al vi ŝajnas vivo
Kiel senvorta revo.
2-6-2001



Pasintjare ni sukcesis, ke la Kanada Poŝta Servo oficiale aldonu Esperanton inter la lingvoj uzataj de Avo Frosto (JulAvo). Bedaŭrinde, nur kelkaj infanoj skribis al li en Esperanto. Malgraŭ tio, ili konsentis denove uzi Esperanton kaj 3 leteroj estis tradukitaj al Esperanto tiel, ke Avo Frosto pretas respondi al la infanoj de la mondo. Temas pri vere bele presitaj leteroj, koloraj eldonitaj de la Kanada Poŝta Servo. Ili do tre plaĉas al infanoj (kaj al gepatroj). Nia peto estas ke vi diskonigu la aferon. Ni antaŭe multe dankas vin.



Komunikaĵo de la
Esperanto-Societo Kebekia

Skribu al Avo-Frosto!

Kristnasko 2003 alvenas kaj kiel ĉiu jare, miloj da infanoj el Kanado kaj la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado infanoj, kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la norda poluso. Denove ĉi jare la geinfanoj kiuj skribos al Avo Frosto ricevos respondon en Esperanto. En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperanlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj siaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.

La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la sekva adreso:

AVO FROSTO
NORDA POLUSO
HOH OHO
KANADO - CANADA

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.

Ni ankaŭ invitas la esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio tiel ke la esperantlingvaj infanoj povos skribi al Avo Frosto ĉi jare.

Bill Thorne



RIMARO

ESTO

atesto
besto
festo
gesto
nesto
vesto

EPO

nepo
stepo

EVO

mevo
nevo
revo

EZO

anestezo
genezo
komplezo
mezo
parentezo
prezo
tezo
trapezo

ICO

cico
delico
kaprico
novico
ofico
polico
servico
spico
vico

IGO

digo
figo
indigo
intrigo
ligo
pigo

IVO

deklivo
drivo
lokomotivo
olivo
vivo

Anoncetoj

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi kun ĝojo anoncas, ke ni lanĉis la korespondan servon. Ekde nun vi povas sendi korespondpetojn, meti anoncojn kaj serĉi partnerojn.

<http://www.edukado.net/korespondado.isp>

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo

Jakovleva Elena

Partizanskaja,
51-1-196
Arhangelsk
163059

Rusio

22 jara viro, baz-meza Esp-isto, studento ĉe la Universitato de Vaŝingtono. Mi studas lingvistikon kaj la francan. Int: teatro; muziko; aliaj kulturoj, legado; moneroj; vojaĝado.

Erik Winsor

Austin House,
Box 44304
Seattle, WA 98195-0044

Usono

winsoet@u.washington.edu

Mi estas 49 jara bankoficisto kaj ankaŭ laboras en Radio Estacio, kiel muzika programisto. Mi deziras korespondi kun novaj gelemantoj, por helpi ilin. Malnovaj geesperantistoj ankaŭ estas bonvenaj.

Luiz Carlos Lemos

Rua Vereador Geraldo V.
Ribeiro, 258, ap 105 - B.
Esperança.

3558 - 410 Governador
Valadares
Minas Gerais

Brazilo

lucar@uai.com.br

Informoj

Mi estas 31 jara fraŭlo, baza Esperantisto, civila inĝeniero. Interesoj: muziko, levi pezajn,

Jamile Smith

South Bend, Indiana, **Usono**

jamile_smith@yahoo.com

Korespondu!

Mi estas 14 jara knabo. Interesoj: lingvoj, muziko, tablo-teniso, naĝado.

Carlos Reyes

Santa Sofia Strato 321
Altomacul, Santiago,

Ĉilio

[<carloerb@terra.cl>](mailto:carloerb@terra.cl)

Mi estas 36 jara esperantisto kaj ekonomikisto. Interesoj: Legado, muziko, landaj kutimoj, familio, historio, ekonomiko, orienta filozofio.

Maurice Farley

Alencar

Rua Pe. José Alves,
423 - Salesianos,
63010-280 Juazeiro
do Norte - CE

Brazilo

farleyalencar@yahoo.com.br


Mi estas 50 jara viro kaj edzo, komencanto en Esperanto. Mi laboras hejme kiel grafika-desegnisto kun mia edzino. Mi ludas pianon, gitaron kaj tamburojn. Mi volas korespondi per ret-poŝto.

Paul Young

Londono,

Britio

paulyoung@blueyonder.co.uk



KOMENCANTO

restas revuo por vi.

Ne forgesu

reaboni ĝin

por 2004!

Mi estas prezidanto de Xi'an-a Esperanto-Asocio. Mi estas komercisto internacia per Esperanto. Mi serĉas korespondantojn kiuj volas komerci per Esperanto.

Sinjoro Wang Tianyi

Jiang-Gong-Lu 8, CN-710043, Xi'an,

Ĉinio

esp@pub.xaonline.com <http://www.komerco.com>

Mi estas 57 jara, lingvoinstruisto sufiĉe esperanto-kapabla. Interesoj: naturo, kulturo, lingvoj, arto, inventspirito de la tekniko, filozofio, pripenso de la vivsenco, dume agnostikulo. Mi ŝatas labori kun la manoj por flegi arbojn.

Claus Winterhoff

Düsseldorf, **Germanio**.

sperantibus@t-online.de

komencanto@r66.ru

<http://Esperanto.net/Komencanto>

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

